

12

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

DECEMBRO 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * * Helaj horizontoj	1
* * * 48 Universala Kongreso de Esperanto	2
Atanas D. Atanasov — ADA. Mi verkis mian unuan leteron (11-a leciono)	4
Viol'n Olja ov. Lingvaj demandoj	6
* * * Esperanto — fakultativa lernobjekto	7
Zora Mladanova. Pio kio?	8
Nkolás Guillén. Malgranda balado pri Plovdivo	9
Limčo Debeljanov. Erila kredo (versajo)	9
S. Mizeruĥa. Por ni denove venis kosma festo (versajo)	9

JUNULARO SUR POSTENO	10
----------------------	----

ORGANIZA VIVO	11
---------------	----

* * * Monda Kongreso por Ĝenerala Malarmado kaj Paco	12
Himenes. Letero el Hispanio	13
Aiman I Su. Letero el Ĉinio	13
Zora Hans. Dimităr Zlatarski — Mid	14

Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv, 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



СВЕТЛИ ХОРИЗОНТИ

Осмият конгрес на БКП с голям успех завърши своята работа. Конгресът начерта величествените перспективи на развитието на нашата страна през предстоящите двадесет години. В този период ще стане окончателното изграждане и затвърдяване на социалистическите производствени отношения и ще започне постепенният преход към комунизма. Ние знаем какви големи успехи постигна нашето народно стопанство през последните години след Априлския пленум на ЦК на БКП. Спрямо 1957 год. производството на средства за производство нарастна с 92,5%, а спрямо 1939 год. — 30 пъти. В сравнение с 1957 год. производството на предмети за потребление нарастна с 61,4%, а в сравнение с 1939 год. — 9 пъти. От целия съвкупен обществен продукт през 1961 год. 60% бяха произведени в промишлеността. Националният доход нарастна с 43,1% в сравнение с 1957 год.

Тия постижения ще бъдат далеч надхвърлени в предстоящия двадесетгодишен период. Промисленото производство ще нарастне 6,5-7 пъти, селското стопанство 2,5 пъти, националният доход 4,5—5 пъти.

Това ще позволи постепенно да се започне преминаване към комунизма. Ще бъдат все по-пълно задоволявани материалните и културни потребности на човека. За това е нужен мир. Ето защо, ние сме кръвно заинтересувани от мирно съвместно съществуване на държави с различен обществен строй, от запазването на мира, от всеобщо разоръжаване.

Всички решения на конгреса са публикувани. На нас ни предстои сериозно то им и задълбочено изучаване, като се включим в съществуващите кръжоци. Няколко основни теми по тия решения могат да бъдат разработени и изнесени на общи събрания на дружествата. А най-важното е, да влеем своите сили и умение в усилията на целия народ, за тяхното изпълнение. Ние притежаваме мощно оръжие за разпространяване на правдива информация в цял свят за нашите успехи и исторически завоевания, за постоянното подобряване на жизнения уровень, за обширното строителство, за хубавите курорти, за природните красоти на нашата родина. Тази задача се подчертава в конгресния доклад на ЦК на БКП. А кой по-добре от нас чрез индивидуална и колективна кореспонденция, чрез сътрудничество в чуждестранните есперантски списания, чрез личен контакт, би могъл да направи това?

Дружествата трябва да изучават опита на отделните есперантисти в това отношение, да организират вечери на международното кореспондиране, да обменят опит, да изпълват със съдържание нашата

кореспонденция, да я направляват. Така ние най-добре ще изпълним нашия есперантски дълг, нашия дълг към народа и родината.

Конгресът бе забележителен и със своите смели решения за разчистване вредните остатъци и пораженията, които нанесе култът към личността, като сковаваше нашия обществен живот, като ограничаваше свободата, като спъваше развитието на страната. Всички есперантисти с голяма радост приветствуват тия решения. Та нали през този период есперантското движение в нашата страна беше пренебрегнато и спъвано, нали тогава имаше предложение есперантският съюз да се влее в съюза на читалищата, което по същество означаваше, той да бъде ликвидиран, както по-късно беше ликвидиран и самият читалищен съюз. Ето защо есперантистите, заедно с всички трудещи се, искрено се радват на успешния завършек на борбата срещу култа към личността и неговите носители.



СОФИО 3-10 VIII 1963

48 UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Sofio, 3—10 de aŭgusto 1963

Preparoj. LKK agas plenforte pri la bona aranĝo de la kongresaj aktivecoj. La salonego de la Universiado, kie okazos la solena inaŭguro, la interkona vespero kaj la balo, kaj la universitataj ejoj, kie okazos la laborkunsidoj, estas jam kontraktitaj. La plej granda supera lernejo en la lando en la centro mem de Sofio malfermos gastame siajn pordegojn por la esperantistoj de la tuta mondo. LKK en Sofio kunsidas regule.

Aliĝoj. Ĝis la mezo de decembro al la kongreso aliĝis 449 personoj el 29 landoj (pasintjare en la sama tempo: 201 La aliĝintoj laŭ landoj: Arabio 1, Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 4, Belgio 7, Brazilo 2, Britio 38, Bulgario 135, Danlando 9, Finnlando 9, Francio 64, Germanio 32, Hispanio 3, Hungario 5, Izraelo 1, Italio 16, Japanio 3, Jugoslavio 15, Kanado 1, Madagaskaro 1, Monako 3, Nederlando 36, Norvegio 9, Nov-Zelando 3, Pollando 12, Svedio 36, Svisio 3, Usono 2. Bulgaraj esperantistoj aliĝis el la jenaj loĝlokoj: Sofio 58, Pazarĝik 11, Ruse 8, Velingrad 7, Stara Zagora 7, Gabrovo 6, Asenovgrad 5, Kjustendil 3, Pernik 3, Kazanlak 2, Trjavna 2, Plovdiv 2, Varna 2, Bansko 2, Batk 2, Buĉin Proĥod 1, Smoljan 1, Momina Klisura 1, Zahari Stojnovo 1, Targoviŝte 1, Beglej 1, Vidin 1, Ŝatrovo 1, Trăstenik 1, Sevlievo 1, Stanke Dimitrov 1, Vraca 2, Opelja 1, Samokov 1. Entute 135.

LKK akceptas ankoraŭ aliĝojn de bulgaraj esperantistoj. Gekamaradoj, ne preterlasu la favorajn templimojn!

Loĝejoj. Estas rezervitaj litoj en diverskategoriaj hoteloj de Sofio, komuna loĝejo en la studentaj domoj kaj en privataj loĝejoj de multaj sofiaj esperantistoj, kiuj sin anoncis. Aliaj promesis anonci aldone novajn litojn. Ni esperas, ke ĉiuj sofiaj esperantistoj en plej proksima tempo anoncos novajn litojn en siaj domoj.

II Internacia Arta Festivalo. En la kadroj de 48-a Universala Esperanto-Kongreso okazos II Internacia Arta Festivalo. En ĝi partoprenos Internacia Arta Teatro de S. Flego, Bulgara Esperanto-Teatro, dram- kaj operartistoj de Bulgario, Pollando kaj aliaj landoj.

VIII Infana Kongreseto. Pri la 8-a Infana Kongreseto oni interesiĝas el multaj landoj. Ankaŭ de multaj lokoj en nia lando oni demandas nin pri ĝi. Ni informas ĉiujn personojn, ke la kongreseto okazos kaj ni povas akcepti ne pli ol 100 infanojn. La aligilojn oni devas sendi al LKK en Sofio aŭ en UEA en Roterdamo. La aligintaj infanoj pagas kongreskotizon de 12 lv. aŭ 35 n. gld. La sumojn oni devas sendi al la 48-a Universala Kongreso, Bulgara Nacia Banko, Sofia Urba Filio, konto 105 ĉ/2993.

Ekskursoj. Loka Kongresa Komitato organizas ĉiutagajn, unutagajn kaj kvintagan postkongresan ekskurson. La ĉiutagaj ekskursoj okazos dum ĉiuj tagoj de la kongreso. Rondveture oni vizitos diversajn vidindaĵojn de Sofio. La prezo de tiuj ekskursoj estas 1 lv. La unutagaj ekskursoj estas jenaj: Sofio—Vitoŝa—Oraj Pontoj—Montodomo „Esperanto“—Kopitoto (kun tagmanĝo)—prezo 3,20 lv.; Sofio—Groto „Ledenika“ (kun maten- kaj tagmanĝo)—prezo 7,5 lv.; Sofio—Lago Pančarevo—Lago Iskâr—Borovec—Sofio (kun tagmanĝo)—prezo 5 lv.; Sofio—Rila Monanejo—Sofio (kun tagmanĝo)—prezo 7 lv. Postkongresa ekskurso: Sofio—Târnovo—Ŝipka—Kazanlak—Suna Bordo—Varna—Ora Strando (vojaĝo, manĝo, tranokto) por 5 tagoj—prezo 53 lv.

Internacia Somera Universitato. Dum la 43-a UK okazos ankaŭ Internacia Somera Universitato kun prelegoj de famaj esperantaj sciencistoj. Rektoro de la Somera Universitato estas Prof. Vasil Peevski. La interesiĝantoj pri la aferoj de la Universitato povas rekte skribi al la Rektoro: str. Gogol № 9, Sofio.

Propagando. Estas ellaborita propaganda sonbendo pri la kongreso kun daŭro de kvindek minutoj. Ĉiu societo povas pruntepreni ĝin por utiligo en siaj kunvenoj. Bulgara Esperanto-kinoklubo pretigis filmon „Bonvenon en Sofio!“, larĝeco 16 mm. Tri kopioj estas disponeblaj al la Esperanto-societoj en eksterlando.

Dum la 48-a UK kaj la 2-a Internacia Arta Festivalo okazos foto-ekspozicio je temo: „La homo“. Ĉiu organizita esperantisto rajtas partopreni la ekspozicion, sendante maksimume kvin fotojn kun minimuma formato de 13/18 cm. Internacia komisiono de fakuloj prijuĝos la fotojn kaj asignos premiojn al la plej bonaj. Ĉion rilate la fotoekspozicion sendu al: Bulgara Esperantista Kino-Foto-Klubo, p. k. 44, Sofia, Bulgario. En venontaj komunikoj kaj en la Dua Oficiala Bulteno aperos pliaj informoj.

Novaj kotizoj. Ekde la 1-a de januaro 1963 validas jenaj novaj kotizoj:

Kongresano	16 lv. (46 ned. gld.)
Edz(in)o de kongresano	8 lv. (23 ned. gld.)
Junuloj malpli ol 20 jaraĵ	5,50 (17 " ")
Studentoj ĝis 30 jaraĵ	9,50 (29 " ")
Blinduloj	8,50 (23 " ")

MI VERKIS MIAN UNUAN LETERON

Dekunua Leciono

Mi revenis hejmen en granda ekscito. Min okupis la penso pri la leteroj, kiujn mi devis skribi. La saman vesperon jam mi sidigis ĉe la tablo.

Antaŭ ol trempi la plumon en la inkon mi pripensis kia povus esti la enhavo de mia letero. La unuan leteron mi deziris prepari por la dana samideano. Dum mi pensis, novaj kaj novaj ideoj venis en mian kapon. Sed oni ne povas ja pensi senfine. Anstataŭ pensi, oni devas agi. Mi do kuraĝe trempas la plumon kaj komencas.

La afero ne marŝis kontentige. Trifoje mi komencis skribi, sed mi disŝiris la foliojn kaj rekomencis. La laboro ne prosperis!

Skribado de leteroj ne estas malfacila afero. Sed — de ordinara leteroj. Nun la okazo estas alia: mi skribas unuan fojon al homo, kiun mi ne konas. Oni ne skribas ĉiun tagon tian leteron.

La ĝisnuna lernado donis al mi sufiĉan provizon da pretaj esprimoj kaj formuloj, kiujn mi povus uzi, sed mi tute ne deziras sendi ŝablonan leteron, kiun mi kombinus el pretaj frazoj. Ekzercado je similaj frazoj dum la lernado nur devas prepari nin por memstara laboro. Post tia preparado jam venas momento por originala verkado. Mi ambiciis verki ion memstaran kaj plenan je senco, je vivo.

Mi penas, sed ĉiam malprospero. Fine en malespero mi venas jam al la penso redoni al la instruisto la adresojn kaj konfesi, ke mi ne kapablas verki seriozan leteron.

Kaj tamen mi persistas kaj rekomencas.

Fine mi aranĝis tekston, kiu pli-malpli kontentigis min. Mi reskribis ĝin kaj ŝanĝis kelkajn vortojn. Duan fojon mi reskribis ĝin kaj ree glatigis iujn esprimojn. Ja korektado de tiaj tekstoj estas io natura.

Post kiam mi reskribis ĝin la trian fojon, la fina redakto jam ŝajnis al mi sufiĉe bona. Tion mi atingis dank' al mia persistado. Morgaŭ mi relegos la leteron kaj reskribos ĝin pure. Kaj tiam mi povos jam sendi ĝin laŭ destino!

HO MIA KOR'!

Ho mia kor', ne batu maltrankvile,
el mia brusto nun ne saltu for!
Plu ten min ne povas mi facile,
ho, mia kor'!

Ho mia kor', post longa laborado
ĉu mi ne venkos en decida hor' ?
Sufiĉe! Trankviliĝu de batado,
ho, mia kor'!
L. L. Zamenhof

Proverboj. — Ripetado estas plej bona lernado.

Vi amas preni — amu ankaŭ redoni!

Pelu mizeron tra la pordo, ĝi revenos tra l'fenestro.

PREPOZICIOJ KIEL KONJUNKCIOJ

Li promenas *anstataŭ* labori.

Ni legu ion *dum* ni atendas. Ĝoju *dum* vi estas juna.

Atendu *ĝis* (ĝis kiam) li venos. Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos, *ĝis* la sankta revo de l'homaro por eterna ben' efektiviĝos.

Krom pentri li povas ankaŭ kanti.

Por pagi vi bezonas monon. Vi devas vidi persone, *por* kompreni la veron.

La prepozicioj *anstataŭ*, *dum*, *ĝis*, *krom*, *por* povas esti samtempe ankaŭ konjunkcioj. En kelkaj okazoj ankaŭ *sen*: sen paroli, sen dormi, sen vidi.

Aliaj prepozicioj povas formi kombinitajn konjunkciojn en ligo kun aliaj konjunkcioj *antaŭ ol* paroli (ne: antaŭ paroli)

pro ke (pro tio ke).

En ligo kun *kiam*: *post kiam*, *ĝis kiam*, *de kiam*, *depost kiam*.

SUFIKSO

AD signifas daŭran agon aŭ kelkfojan agon.

Mi saltis (la salto estis unufoja). Mi saltadis (mi faris plurajn saltojn, mi saltis daŭre — unu, du, tri ktp. fojojn).

Salto — saltado. Lego — legado. Kanto — kantado. Pafu (unufoja) — pafado (plurfoja, daŭra faro de pafoj). Resto — restado. Aĉeto — aĉetado.

Mi pren (unufoje) — mi prenas (ĉiam, multfoje).

La sufikso AD uzigas nur kiam estas bezone esprimi klare la daŭrecon aŭ la plurfojecon de la ago. Se la penso estas klara ankaŭ sen ĝi, prefere oni uzu la pli simplan formon:

Ĉiutage mi pren mian pafilon kaj mi iris ĉasi. (Tie ĉi la penso pri plurfojecon estas klara sen la sufikso AD).

La sufikso AD ofte akcentas la longan daŭron de ago: Ni marŝis, marŝadis. Mi pensis, pensadis. Li parolis, paroladis sen laciĝo.

La sama sufikso esprimas ankaŭ la verbecon de vortoj: *martelo* estas nomo de instrumento, *martelado*, nomo de ago, kiun oni faras per tiu instrumento.

PREFIKSO

RE signifas:

a) Ripeton de ago, fari saman agon denove.

Mi relegas tiun libron: mi jam legis ĝin kaj nun mi legas ĝin duan fojon.

Mi reskribas la tekston jam kvaran fojon.

Ŝi rekantas la saman kanton.

b) Returnan agon, movon en returna direkto.

Mi revenas — mi venas denove en lokon, kie mi jam estis antaŭe.

Mi resendas al vi la libron — mi sendas al vi returne la libron.

Mi redonas al li la monon, kiun li pruntedonis al mi.

Ree = denove, ankoraŭ unu fojon. Li venas ree al ni.

Noto. Por la dua signifo de *re* iuj esperantistoj preferas uzi la neoficialan prefikson *retro*: *retrodoni*, *retromarŝi* ktp.

APOSTROFO

En la poezio oni povas ellasi:

a) la finaĵon de la artikolo: l'espero, l'obstino, de l'patro;

b) la finaĵon O de la substantivo en ununombro: Ho mia kor'. Malfraŭa temp' aŭtuna. Malvarma vent' senĉese blovis. Kaj ploras sur strat' violonoj.

Oni ne povas ellasi la finaĵojn *on, oj, ojn*, kaj ankaŭ la finaĵojn de aliaj gramatikaj kategorioj (adjektivoj, adverboj kc.).

Ĉe la artikolo oni povas ellasi la finaĵon plej bone, kiam la prepozicio finas per vokalo: de l', pri l', tra l', ktp.

En la ordinara parolo oni uzas la mallongan esprimon *dank' al* (dank' al dio, dank' al via helpo). Same: *halt!* (*haltu* uzata kiel interjekcio).

NOTINDAJ VORTUZOJ KAJ ESPRIMOJ

Mi havas sufiĉan provizon *da* vortoj — Mi havas sufiĉan provizon *de* vortoj. (Ambaŭ esprimoj estas korektaj; en la unua ni akcentas la kvantecon de la provizo).

Memstara (mem-stara) — kiu ne dependas de iu aŭ de io. Memstara ago. Memstara decido. Memstara pensado.

Mi venis al la *penso redoni* la adresojn (pri redono de la adresoj). Al mi venis la *ideo turni min* al vi per letero. Intenco veturi (por veturo). Deziro vidi (por vido). Emo labori (por laboro).

Pli-malpli = en certa grado, nek multe, nek malmulte.

EKZERCOJ

1. Kio estas la diferenco inter: Kolekto — kolektado. Penso — pensado. Danco — dancado. Ludo — ludado.

2. Por bone uzi la lingvon estas necesaj multaj ekzerc . . .

Por bone uzi la lingvon estas necesa longa ekzerc . . .

Tiu ĉi danco ne estas malfacila, sed tamen tre longa danc . . . lacigos vin.

La leg . . . de libroj estas utila kaj agrabla okupo.

Labor . . . sur la kampo estas saniga kaj fortiga.

3. Vi jam legis tiun ĉi libron, kial vi re . . . ĝin?

Mi sendis al Marko mian libron; post kiam li tralegos ĝin, li . . . ĝin al mi.

Ŝi kantis tre belan kanton; ĉiuj insistis, ke ŝi re . . . ĝin.

Mi faros la horloĝon denove bona = Mi . . . la horloĝon.

Mi fariĝos denove sana = Mi . . .

1. PREZENCŖ ANSTATAU FUTURO

Mi ricevis la jenan demandon de k-do Pânĉev el Kazanlâk:

„Ofte en nia parolanta rondo okazas viglaj diskutoj pri lingvaj demandoj, tamen ne ĉiam ni atingas samopinion pri ili. Lastatempe aperis demando — ĉu ni povas fari frazojn en Esperanto laŭ senco pri estonta tempo, sed laŭforme en estanta tempo.

Ekzemplo. La Esperanto-kongreso okazos dum aŭgusto en Sofio. Grupo de geesperantistoj en Kazanlâk parolas dum majo, ke ili devas iri al la kongreso nepre bone organizitaj. Ĉe ili venas esperantisto, al kiu ili diras, ke dum la tuta monato aŭgusto li devas resti en Kazanlâk, por ke li preparu decan bonvenon de la kongresanoj dezirantaj viziti la urbon.

Forte kolerigita li kontraŭdiras: „Ne, mi ankaŭ iras al la kongreso!“

Respondo. Esperanto estas tre preciza kaj logika lingvo. Ĝiaj gramatikaj formoj ĉiam esprimas la ĝustan nuancon de la esprimenda penso. En tiu senco en la suprecitita letereto de k-do Pânĉev estas pli logike diri „li devas resti en Kazanlâk“ (ne „devas“), ĉar ja temas pri estonta tempo. Tamen en sia disvolvado ankaŭ Esperanto kiel ĉiuj aliaj lingvoj, akomodigante al la vivo, strebante ne nur klare esprimi la penson, sed respuguli ankaŭ nuancojn, tendencojn, sentojn, laŭŝajne deflanĝigas de la logikeco kaj de la severa gramatikeco. Fakte ĝi esprimas ian nuancon de la penso, firmecon de la volo, rilaton al la ago, fare de la parolanto.

En la supra kazo la kolerigita respondo de la esperantisto prezenco anstataŭ futuro: „Ne, mi ankaŭ iras al la kongreso!“ — esprimas lian decidemon, lian firman volon partopreni la kongreson. La estonto ĉiam kaŝas en si ian gradon de necerteco. Per la prezenca formo oni esprimas certecon, la nerompeblan volon okazigi la intencon.

En tiu senco la supra frazo estas regula kaj oni povas en tiaj kazoj uzi ĝin, precipe se la tempo de la okazigo estas proksima.

2. DE POST, DE ANTAŬ, DE, DUM

K-dino Ĵeljzka Stanimirova el Burgas skribas:

„En la marta numero de BE sur la 8-a paĝo mi legas en la komenco: „De post du monatoj mi lernas la internacian lingvon.“ Mi ne konsentas pri tiu **de post**. Mi petas vian klarigon.“

Respondo. K-dino Stanimirova pravas pri la nekonsento. „De post“ signifas, ke post iu momento komenciĝis ia agado. Tiu momento povas esti esprimita per dato, jaro, ia okazintaĵo, ago, diro ktp. Ĝi devas esti nepre **momento**, **punkto** en la tempo. „De post du monatoj“ signifas, ke post la forpaso de la du monatoj ekestos la momento post kiu komenciĝos la ago — la lernado de la internacia lingvo. En tiu ĉi kazo oni devas uzi la estontan tempon: „De post du monatoj mi (ek)lernos la internacian lingvon.“ Sed evidente la aŭtoro ne deziris diri tion. Li deziris diri, ke antaŭ la komenco de la daŭro de la du monatoj estas la momento, post kiu li komencis lerni. En tia okazo li devas diri: „De antaŭ du monatoj mi lernas la internacian lingvon.“ Aŭ en tiu okazo, ĉar estas daŭro ni povus diri: „Dum du monatoj mi lernas la internacian lingvon“. Aŭ kio estas egala: „Du monatojn mi lernas la internacian lingvon.“

Konkludo. Kiam la cirkonstancaj vortoj esprimas tempdaŭron oni ne povas uzi la malsimplan prepozicion **de post**, ĉar tio signifas estontan tempon, ke la evento okazos, la ago komenciĝos post la forpaso de tiu tempdaŭro. En tia okazo oni devas uzi **de antaŭ**, aŭ dum, aŭ akuzativon. Se oni deziras esprimi komencon de iu ago en la pasinteco kaj oni uzas vortojn esprimantajn punkton en la tempo, limon, post kiu komenciĝis la ago, nur en tia kazo oni povas uzi **de post**.

Ekzemploj.

1. **Mi lernas Esperanton de post 1955.** Tio signifas, ke mi komencis lerni Esperanton tuj post la forpaso de 1955 jaro, t. e. en la komenco de 1956.

2. **De post la Septembra ribelo mi estis senlabora.** Tio signifas, ke tuj post la Septembra ribelo mi estiĝis senlabora, kaj mi daŭre estas senlabora en la momento, pri kiu mi parolas.

3. **Ŝi estas freneza de post la morto de sia patro.** Tio signifas, ke ŝi freneziĝis tuj post la morto de sia patro kaj daŭre estas tia en la momento de la parolo.

En ĉiuj ĉi tri ekzemploj estas tempopunkto tuj post kiu komenciĝis ia ago, aŭ ekestis ia stato.

SED:

1. **De antaŭ unu jaro mi lernas Esperanton.** Tie ĉi oni ne povas diri **de post**, ĉar la cirkonstancaj vortoj unu jaro esprimas ne tempopunkton, sed tempodaŭron. Se oni dirus **de post**, tio signifus, ke la momento de la komenciĝo estas post la forpaso de tiu periodo de unu jaro. Sed fakte tiu ĉi momento estas antaŭ la ekkuro de tiu periodo de unu jaro. Pro tio estas regule diri **de antaŭ** aŭ „unu jaron mi lernas Esperanton.“

2. **De antaŭ la Septembra ribelo mi estas membro de BKP.** Tio signifas, ke mi membriĝis al BKP antaŭ la ribelo kaj mi daŭras esti membro.

3. **De la Septembra ribelo mi estas membro de BKP.** En tiu ĉi okazo ni ne ĝustigas la striktan momenton. La membriĝo en la daŭro de la ribelo mem.

En la tri lastaj kazoj la cirkonstancaj vortoj esprimas daŭron, pro tio ni ne uzas **de post**.

Violin Oljanov

ESPERANTO — FAKULTATIVA LERNOBJEKTO EN SUPERA LERNEJO

La akademio konsilantaro de la Supera Ekonomi-financa Instituto en Sviŝtov, la 24-an de oktobro decidis enkonduki Esperanton fakultative. Oni oficigis k-don Bejko Markov kiel pagantan lektoron. Aliĝis 50 gestudentoj en du grupoj, kiuj lernos la lingvon po du instruhoroj semajne.

TRA LA GAZETARO

En ĵurnalo „Dunavski student“ (Danuba studento — Sviŝtov, 10. XI. 1962) artikolo „Esperanto kaj la internacia kompreniĝo“ — kun portreto de L. Zamenhof.

En ĵurnalo „Stopanoved“ — Varna (13. XI. 1962) — informo de Donka P. Gavrilova, studentino — „Studentoj de Supera Instituto de Nacia Ekonomio helpe al la junpioniroj de ternejo Ĥaĝi Dimitr“, Varna“.

En ĵurnalo „Oteĉestven Front“ — Sofio (de 27. XI. 1962) aperis informo de J. Dimitrov pri la II Internacia Arta Esperanto-Festivalo en la kadroj de 48-a Universala Esperanto-Kongreso en Sofio, 1963.

Vizitis nian urbon, la nigramaran Varnon, amasega turista grupo el Usono — je la 13-a de marto 1962. Kune kun la geamerikanoj estis ankaŭ grekaj geturistoj. Invadis la gastoj niajn stratojn, magazenojn, la centron kaj la ĉirkaŭaĵojn de la urbo . . . Por ĉion vidi!

Kaj preskaŭ ĉiuj kuraĝis sincere deklari, ke plaĉis al ili niaj multaj novaj konstruoj, niaj abundaj kaj variaj varoj, la speciale por ili plenumita en la Nacia Teatro amuzprogramo, nia afabla, gastama, kontenta kaj serioze laboranta popolo — bone vestita, videble sata, sincere ĝoja kaj sendube feliĉa . . . Ne malgaja, ne senespera!

Kaj rapidis ĉiuj avide aĉetadi kion ajn por rememoro el Varna, el Bulgario. Kelkaj grekinoj gaje kaj infanpetole ornamis sin per altaj blankaj bulgaraj kalpakoj el ŝafida pelto . . . Multaj geusonanoj regalis sin en niaj dolĉaĵejoj per bulgaraj frandaĵoj . . . Aŭ malŝpare uzadis siajn fotoaparatojn.

En unu centra strato, ĉe angula multhoma trotuaro, kun balailo kaj ŝovelilo en la manoj, kolektadis zorgeme la hazarde falintajn sur la asfaltan balaĵojn unu stratbalaistino. Estis ŝi 30—35 jara virino, vestita en pura vatita laborkostumo kaj brilaj gumbotoj, kun bunta kaptuko, ligita ĉirkaŭ ŝia simpatia kaj beleta vizago.

Unu usonano rimarkis ŝin kaj — nesciate pro kio — ekdeziris fotografi ŝin.

La stratpurigistino havis nenion kontraŭdiran kaj gaje bonkore konsentis iom pozi antaŭ la usona fotoaparato.

Restis tre kontenta la fremdlanda nia gasto kaj — nesciate pro kio — elpoŝigis sian monujon, eligis el ĝi kvinlivan monbileton kaj proponis ĝin al la virino, dirante en sia lingvo:

— Mi dankis vin. Aĉetu al vi kion ajn, kion vi bezonas . . .

Ŝi ekrigardis lin konsternita, ne etendis manon por akcepti la monon kaj sin turnis al la granda homamaso, haltinta jam tie pro scivolemo:

— Kion li diras? Pro kio li donas al mi monon? Monon mi havas. Pro kio li ofendas min? Mi ne estas almozulino.

Trovigis en la homamaso tradukanto, kiu venis por helpi al nia konsternita kamaradino. La usonano donis al li sian „donacatan“ novan banknoton kaj ripetis siajn vortojn, kiujn la peranto tradukis al ŝi.

— Mi bezonas nenion, mi havas ĉion, mi donacojn ne akceptas—diris la virino al la ĉeestantoj ridete kaj demandis severe sian hazardan peranton: — El kiu lando venis li?

— El Ameriko, el Usono.

— El Usono? Li estas amerikano? — ekĝojis ŝi. — Nu, kun sano li foriri en sian Amerikon! . . . Diru al li, kamarado, ke la homoj en Bulgario havas monon, ne estas malriĉuloj, nek almozuloj . . .

Kaj — nesciate pro kio — la stratbalaistino enigis ambaŭ manojn en la poŝojn de sia vatita laborpantalono, eligis po kelkaj unulevaj kaj dulevaj banknotoj kaj unu el la dulevaj donis al la tradukanto, dirante kun bonkora rideto:

— Donu al tiu ĉi amerikano tiun ĉi monon de mi kaj diru al li, kamarado, ke ni, ĉiuj, en Bulgario laboras kaj ricevas salajrojn, ke ni ricevas ankaŭ monpremiojn por supernorma laboro . . . Li regalu sin kiel gasto de Varna, de Bulgario. Eble li ne havas sufiĉan bulgaran monon . . . Mi estas laboristino kaj deziras pacon kaj amikecon kun la amerika popolo.

MALGRANDA BALADO PRI PLOVDIVO

En malnova urbeto Plovdivo,
malproksime, for,
mia kor', mortis iun nokton
kaj nenio krom.

Unu longa rigardo verda,
malproksime, for,
lipoj malsekaj malpermesaj
kaj nenio krom.

Ia ĉiel' bulgara briladis,
malproksime, for,
plena de stelaro tremanta
kaj nenio krom.

Ho, etaj paŝoj sur la strato,
malproksime, for,
jam lastaj paŝoj por ĉiame
kaj nenio krom!

Apud la pordo misterplena,
malproksime, for,
la mano blanka, sola kiso
kaj nenio krom.

El la hispana: Raúl Juárez Sedeno,
Kubo

BRILA KREDO

Al mond' malnova venas lasta tag',
kateno post kateno disrompiĝas
kaj super ĝia ruiniga plag'
altaro de l' justeco jam leviĝas.

Mallum' netravidebla kuras for,
heligas sun' dormeman firmamenton—
svingegas siajn flagojn kun fervor'
sennombraj batalantaj regimentoj.

Radi' matena brilas en rigard' —
nenia tim' pro luktoj antaŭstaraj,
ĉar kontraŭ ties kunigita ard'
pereas juko kaj dolor' amaraj.

Serĉitan vojon ili trovis nun,
kaj ili vidas bordojn purpurorajn...
Ho, brila kred' je nova vivo-jun',
varmigu kaj altigu vi la korojn.

El la bulgara: Canko Murgin

POR NI DENOVE VENIS KOSMA FESTO

Salutas kaj gratulas nin homaro.
Kaj havas ni kialon por fier':
Nun grupe ŝipoj plugas kosman maron
pli malproksime de l' gepatra Ter'.

Jen, Orientoj* du en la ĉielo
tra Universo flugas al senlim',
rigardas Teron de alteco stela,
salutojn sendas el la malproksim'!

En kosmon ni ne portas bomban ŝarĝon,
nek mortminacon mondan po. tas ni.
Per nia koro, per bravec' kaj saĝo
ni trovas novajn fontojn de la sci'.

Por ni denove venis kosma festo.
Pri nova venk' eterne sonu kant'!
„La Kosmonaŭt' — Unua“, ĉiam estos,
Popolo mia, mia Patroland'!

15. 7. 1962

S. Mizeruĥa, Kiev

Dirinte tion, ŝi reenpoŝigis sian ceteran monon, prenis denove la balailon kaj la ŝovelilon kaj trankvile serioze daŭrigis sian interrompitan laboron.

La homamaso admire ekzumis. La amerikano konsterniĝis kaj konfuzite ridetanta penis bone kompreni tion, kion al li tradukadis la peranto, kiu samtempe etendadis al li la du brile novajn monbiletojn, la kvinlevan kaj la dudevan.

Fininte nia bulgaro enpuŝis la monon en la surbrustan poŝon de la amerikano kaj rapide foriris... Tuj disiris ankaŭ la homamaso... Kaj — nesiate pro kio — ĉiuj silente ridetis kaj plu ne komentis la okazintaĵon. Sed multaj preterpasis la balaistaron kaj diris al ŝi:

— Brave al vi, kamaradino!



19-a INTERNACIA JUNULARA ESPERANTO-KONGRESO

VRACA, 27 julio — 3 aŭgusto 1963

Nun estas presata kaj tre baldaŭ aperos la Unua oficiala bulteno de la Kongreso, riĉe ilustrita informilo enhavanta la aliĝilon kaj plurajn utilajn informojn. Ĉiuj bulgaraj esperantistoj estas petataj disponigi al la Kongresa komitato, adresojn de siaj korespondantoj aŭ konatuloj, junuloj precipe el la okcidentaj landoj, kiuj interesiĝis pri la Kongreso kaj nia lando. Al ili ni sendos persone ekzempleron de la bulteno.

Tri vesperoj el la provizora programo estas rezervitaj por la junaj amatoroj de la kantado, recitado, dancado kaj teatro. Ĉiuj junularaj grupoj, kiuj intencas iamaniere partopreni la belartajn programojn de la Kongreso estas insiste petataj sin anonci plej malfrue ĝis la fino de decembro, kun kiom eble pli detalaj informoj pri la karaktero de la ensemblo kaj ĝia programo.

En preparo estas speciala sonbendo pri la Kongreso en Vraca kaj pri TEJO kaj la junulara Esp.-movado ĝenerale. Ĝi estos taŭga helpilo por arango de specialaj vesperoj pri la Kongreso. Mendu ĝin jam nun de la Kongresa Komitato.

La Junularaj grupoj en la lando kaj pluraj societoj jam ricevis cirkuleran leteron de la KK kun kontrolciferoj por aliĝo. Por plifaciligi la laboron de la KK la grupaj kaj societaj estroj estas petataj ĝis la 30-a de januaro sendi la aliĝilojn de siaj membroj akompanitaj de minimuma antaŭpago de 10 lv. La Kongresa Komitato gardas por si la rajton post tiu dato disponigi la liberajn lokojn al aliaj grupoj kaj societoj, kiuj montras intereson. La kompleta kotizo nepre devas esti aranĝita antaŭ la 1. IV. 1963, se oni deziras profiti la rabaton.

Ĉion pri la kongreso sendu al: JUNULARA KONGRESO, Sofio, p. k. 587.
Konto: № 15/1886 en DSK — Sofia/Blagoevski rajon.

JUNULARA AGADO EN RUSE

Post komuna vizito de la pola filmo „Tiu ĉi nokton pereos la urbo“ nia junulara Esp.-grupo aranĝis ĝian pridiskuton. La ok parolintoj, nur en Esperanto, emfazis siajn impresojn de la filmo, montranta la rezultojn de la dua mondmilito: ruinigitaj urboj kaj landoj, morto kaj misero por milionoj da homoj. Samtempe oni substrekis, kia estis kaj kia povus esti la sorto de ĉiuj militinstigantoj. Similaj kunvenoj okazas ĉiumarde. La gejunuloj praktikas la lingvon kaj preparas sin por inda renkonto de la alilandaj gastoj en la TEJO-Kongreso en Vraca, venontjare.

... EN VARNA

En lernejo „Haĝi Dimitr“ estis fondita pionira Esperanto-taĉmento „D-ro Zamenhof“ konsistanta el 45 pioniroj. La pioniroj lernas Esperanton ĉiulunde po unu horo. La ĝisnunaj rezultoj estas kuragigaj. La infanoj jam scias du kantojn en Esperanto, kio impresas la ceterajn lernantojn. Helpe de siaj gvidantoj — membroj de la „Studenta amikeco“, la pioniroj jam skribis la unuajn kartojn eksterlande.

Novaj kursoj por studentoj estas gvidataj en la Ekonomia instituto kaj en la Kemia instituto. Ĉiujaŭde en la klubejo de societo „Al-

batro“ kunvenadas parolanta rondo, celanta la lingvan perfektigon de la gejunuloj. Partoprenas precipe membroj de „Studenta amikeco“. La rondon gvidas N. Pilev.

... KAJ EN SOFIO

La 19-an de novembro, post sufiĉe longa paŭzo, denove kolektiĝis la gejunuloj esperantistoj el Sofio. Oni aŭdis informojn pri la maniero de aliĝo al la 19-a TEJO-Kongreso en Vraca kaj pri la jam faritaj laboroj. Oni priparolis plurajn iniciatojn lige kun la partopreno de la sofiaj gejunuloj en la venontjaraj internaciaj kongresoj. Ĉiulunde la gejunuloj kolektiĝados por efektiviĝi tiujn iniciatojn, por praktiki la lingvon kaj por iom danci.

M. Momĉev, N. Pilev, S. S.

Polski Trâmbeș. Laŭtradicie ankaŭ dum tiu ĉi jaro Esperanto estas studata en nia lernejo. Regule funkcias rondoj en 8-a, 9-a, 10-a kaj 11-a klasoj. Krom tio funkcias pionira kurso en 6-a klaso. La aplikado de la noveldonita lernolibro ege faciligas kaj sukcesigas la lernadon de la lingvo.

La rondgvidantoj-instruistoj estas pagataj laŭ la tarifo de la Ministerio. Tiamaniere la ofi-

ciala agnoskado de nia agado daŭre kuraĝigas nin.

La Esperanto-grupo ĉe la gimnazio en Polski Trâmbeš, Târnovsko, atendas korespondantojn el la tuta mondo.

Hrisman

SVIŠTOV. Laŭ iniciato de prof. Hr. Marinov kaj prof. M. Rusinov — rektoro de la Supera Ekonomia Instituto, la akademia konsilantaro decidis enkonduki Esperanton fakultative. K-do

B. Markov kaj Iv. Kozlev, ambaŭ el Levski arangis en la instituto ekspozicion, kiu vekis grandan intereson inter la gestudentoj. Kvindek da studentoj ekdeziris lerni la internacian lingvon. La instruado komencis la 1-an de nov. en du klasoj, po du instruhoroj semajne kaj daŭros dum la tuta lernjaro 1962—1963 (du semestroj). Oni nomis k-don Bejko Markov — eksinstruisto, salajrata esperantista lektoro.

Bejko Markov

ORGANIZA VIVO

STANKE DIMITROV. Nia societo „Marek“ laŭplane laboras por plenumo de la decidoj kaj rezolucio de la 35-a Kongreso de BEA. Plurajn kursojn por gelnantoj kaj civitanoj gvidas nia sindona kamarado Boris Drenski. Inter la kursanoj diligente lernas ankaŭ dek-jara knabino Olga Dimova. En societaj kunvenoj, la gejunuloj Nikola Petrov kaj Angelina Todorova raportis pri sia partopreno en la junulara festivalo en Helsinko kaj en ekskurso tra Pollando.

Iv. Dobrovski

KARLOVO. La antaŭstaranta 48-a UK en Sofio donas al ni grandan impulson por plivigligo de nia agado, por streĉigo de niaj fortoj, por varbi pli grandan nombron da kursanoj kaj plialtigi ilian lingvan nivelon. Nun funkcias en la urbo kursoj por progresintoj, por civitanoj kaj kelkaj kursoj en la lernejoj. Tiamaniere ni realigas la taskon pri rapida enpenetro en la lernejoj. La bone funkciantaj kursoj en la gimnazio kaj en la teknika lernejo jam formigis kiel junularaj grupoj de nia societo, elektante siajn estrarojn, preparante mallongajn programojn kaj prelegetojn je diversaj temoj. Inter la gelnantoj eĉ komencis konkurado.

Cv. Cvetkov

STARA ZAGORA. Dum oktobro, gasto al la societoj „Verda stelo“ en Stara Zagora kaj „Roza valo“ en Kazanlâk estis la KKS de UEA — s-ro G. Pompilio. En Stara Zagora akompanita de geesperantistoj li trarigardis la urbon, la distriktan muzeon kaj la parkon „Lenin“. Same li vizitis la gigantan azotsterkan uzinon apud Stara Zagora, kie li interparolis kun ĉefoj de la uzino kaj esperantistoj laborantaj tie. En intervjuo antaŭ radio Stara Zagora li esprimis siajn belajn impresojn pri Bulgario, pri la lokoj, kiujn li estis vizitinta — Rila monaĥejo, Plovdiv kaj Pazargik, samkiel sian admiron pro la vasta konstruado en Stara Zagora kaj en la azotsterka uzino kaj pro la granda entuziasmo, kun kiu la bulgara popolo partoprenas tiun konstruadon.

En Kazanlâk s-ro Pompilio renkontigis kun grupo da esperantistoj, kiuj estas atendintaj lin kelkajn horojn en la propra klubejo de la societo. Post kortuŝa adiaŭo en Kazanlâk, ricevinte donacetojn, per automobilo kaj akompanita de D. Martinov — prez. de la societo en Kazanlâk kaj D. Dobrev — sekretario de la societo en Stara Zagora, li vizitis la historiajn lokojn en vil. Krân kaj Šipka kaj la pinton Stoletoŭ — celoj de la ekskursoj post la 48-a UK.

Dobri Dobrev

La jarkunvenoj okazos inter la 10-a de januaro kaj la 10-a de marto. De ties modela okazigo dependas la pluaj rezultoj de nia agado. Ni streĉu niajn fortojn por organiza plifortigo de la societoj!

MONDA KONGRESO POR ĜENERALA MALARMADO KAJ PACO

Moskvo, 9—14 julio 1962

DEKLARO

DE LA DELEGITARO DE MONDPACA ESPERANTA MOVADO (MEM)

La fortoj de milito en la tuta mondo ĉiam pli impertinente spite al la volo de popoloj kreas sian nigran aferon de propagando de nova mondmilito. La eksplodo de megatuna bombo en la kosmo laŭ la ordono de prezidanto Kennedy klare montris, ke la homaro devas dekobligi siajn penojn por surmeti la kvietigan ĉemizon sur tiuj, kies krima volo starigas la mondon ĉe limo de katastrofo, de ĉion ruiniga milito.

Sub la signo de unuiĝo de ĉiuj pacamantaj fortoj pasis la preparado al nia Kongreso. Sub la signo de decidema kaj ĉiufanka fortigo de senlaca kaj aktiva batalado por ĝenerala malarmado, por neniigo de mortportanta armilaro, por la paco pasas nun laboro de Kongreso.

Inter voloj kaj formoj, uzendaj por ĉi celoj grandega signifo apartenas al la ĉiam pli vasta efektivigo de granda ideo de internacia lingvo-ilo de interkompreno de tutmondaj popoloj, de paca kunlaborado kaj kunigado de iliaj fortoj en batalado kontraŭ la milito.

Mondpaca Esperantista Movado dum dek jaroj de sia ekzistado unuiĝis esperantistojn — pacdefendantojn de 40 landoj, direktas ilian agadon al solvo de praktikaj taskoj de lukto por la paco, amikeco kaj kunlaborado inter popoloj. Ĉiumonate alterne en diversaj landoj estas eldonata internacia revuo „Paco“.

Tamen praktika apliko de la internacia lingvo por ĉi celoj kaj altiro de esperantaj organizaĵoj al por paca agado donus senkompare pli grandan efekteton, se Monda Packonsilantaro kaj naciaj packomitatoj uzus ilin en sia laboro pli vaste kaj regule.

Ek de unua tago de sia vivo, ĝuste dum 75 jaroj, la lingvo Esperanto portis kaj portas sur sia standardo alvokon al reciproka kompreno kaj amikeco inter popoloj sendepende de raso kaj religio, al humanismo kaj batalo por paco kaj progreso.

Ni petas Mondan Konsilantaron kaj ĉiujn samcelajn naciajn organizaĵojn uzi fortojn de MEM kiel konstante kunlaboranta organizaĵo. Ni alvokas vaste uzi internacian lingvon Esperanto, elprovidi dum tri kvaronojn de jarcento kiel bonega ilo de porpaca, porprogresita kaj kultura kunlaborado.

Ĉiuj fortoj kaj iloj servu al granda celo de la homaro — al ĝenerala malarmado, paco kaj eterna amikeco inter ĉiuj popoloj de la Tero!

10. VII. 1962

Moskvo

La delegitaro de Esperanta Mondpaca Movado

- A. BALAGÈ (A. Balague) — Ĝenerala sekretario de MEM (Aŭstrio)
- A. B. BĚJRIS (A. B. Beiriz) — (Brazilo)
- E. BOKAREV (Sovet-Unio)
- V. DARVIL (W. Darvill) — (Anglio)
- G. NADĴAKOV (Bulgario)
- SIN GO SING (Koreo—KNDR)
- B. TOLL (Sovet-Unio)
- R. VINDL (R. Wiendl) — (Svedio)

LETERO EL HISPANIO

Tre kara kamarado,

Siatempe mi ricevis vian leteron kaj poste mi ankaŭ ricevis la numerojn de „Nuntempa Bulgario“.

Ankaŭ bonorde mi ricevis ekzemplerojn de „Bulgara Esperantisto“, kiujn post atenta tralego, mi pruntedonis al kelkaj esperantistoj de nia societo. Sincere parolante mi devas diri, ke la esperantaj presaĵoj el via lando ludas gravegan rolon ĉe ni por konigi vian vivon kaj bataladon por progreso kaj paco. Nun dank' al tiuj revuoj ni scias aferojn el via lando pri kiuj sen tio ni estus tute nenion sciantaj.

Atente mi legis viajn artikolojn, ĉiam trafaj kaj bonegaj. Mi sincere admiras vin pro via lerteco kaj kapablo verki tiajn artikolojn: tio pravas ke vi estas tre aktiva sociaganto. Sciu, kara samideano, ke ankaŭ en Hispanio viaj leteroj estas atente ricevitaj!

Mi ankaŭ kelkfoje provis verki artikolojn, sed mi ne sukcesis trafe surpaperigi miajn ideojn, verŝajne mankas al mi verkistan talenton... Aliflanke, kiam mi prenas skribilon mi devas troe atenti pri tio kion mi „volas“ diri kaj pri tio kion mi „povas“ diri. Ĉu vi scias kion signifas voli, sed ne povi? Tio estas vera turmento por mia cerbo! Do, imagu kia ĝojo estas por mi povi legi plensukajn artikolojn en kiuj estas ideoj, kiujn mi ne povas esprimi.

Mi deziras reaboni je „Nuntempa Bulgario“ por la jaro 1963. Ĉu vi povas reabonigi min al tiu gazeto?

Antaŭ nelonge oni projekciis la usonan filmon „Spartako“. La filmo temas pri la vivo kaj batalado por libereco fare de Spartako. Ĝi estas unu el la plej bonaj filmoj, kiujn mi vidis. Mi rememoras ke estante knabo mi legis libreton pri Spartako, kies kortuŝa historio forte emociigis min. Ek de tiam mi tre deziris vidi filmon pri tiu temo. La filmo estas perfekta el teknika vidpunkto, eĉ kolosa: la geaktoroj plenumas siajn rolojn majstre kaj la argumento estas digne prezentita, konsiderante la cirkonstancojn nun regantaj en Usono. Entute vidinda filmo!

Pri nia komuna amiko mi sciigas al vi, ke li nun laboras en S., sed preskaŭ ĉiusemajne li revenas en K. dum dimanĉo. Mi ne scias, ĉu li partoprenos en la venonta Universala Kongreso de Esperanto; iam li diris al mi ke li intencos ĉeesti, sed li ankoraŭ ne povas certigi tion. Mi ankaŭ tre volonte renkontiĝus kun vi, sed bedaŭrinde tio ne eblas, ĉar mi ne povas veturi eksterlanden. Mi esperas, ke iam mi povas koni vin persone kaj paroli kun vi „longe larĝe kaj profunde“. Intertempe ricevu la plej sincerajn bondezirojn de via hispana amiko

Himenes

LETERO EL ĈINIO

En la jaro 1919 komenciĝis la fama Movado de Nova Kulturo. Niaj verkistoj komencis verki en la nova ĉina lingvo. La alilandaj literaturoj ekaperis en la ĉina traduko, kaj komencis influi nian kulturen vivon. Sed pro manko de personoj scipovantaj diversajn lingvojn, niaj tradukistoj tradukis la verkojn de la „malgrandaj landoj“ preskaŭ nur laŭ la angla. Jam en tiu periodo Esperanto ekludis gravan rolon en la enkonduko de alilandaj literaturoj en Ĉinio. Nome, pere de Esperanto la bulgara literaturo estis enkondukita en nian landon por unua fojo.

Antaŭ 35 jaroj en niaj literaturaj revuoj ekaperis bulgaraj poemoj kaj prozo, tradukitaj pere de Esperanto. Inter ili estis verkoj de la bulgara verkisto Ivan Vazov k. a. Ankaŭ la nomo de la konata bulgara esperantisto-tradukisto Iv. Krăstnov estis menciita en niaj revuoj. Do, danke al liaj tradukoj kaj danke al Esperanto ni povis enkonduki la bulgaran literaturon en Ĉinio.

Por mi mem, se ne estis Esperanto, mi neniam estus povinta ekkoni vian vivon kaj vian kulturon. Mi ne scias la bulgaran lingvon, sed pere de la revuoj „Nuntempa Bulgario“ kaj „Bulgara Esperantisto“ mi estas bonege informita pri via hodiaŭa vivo kaj viaj sukcesoj sur la kultura kaj industria kampoj. Pere de Esperanto mi havas feliĉon kontakti perletere kun bulgaraj esperantistoj. Tio pravas, ke Esperanto estas la plej taŭga lingvo por internacia amikeco.

Antaŭ nelonge mi eksciis, ke la 48-a Universala kongreso okazos en Sofio. Tiu novaĵo min ege ĝojigis. La Esperanta movado en Bulgario estas unu el la plej fortaj en la mondo.

Mi esperas veni en Sofio por partopreni la 48-an universalan kongreson kaj vidi la belan Sofion, kiun, (ho ve!) mi povis admiri ĝis nun nur en la ilustritaj revuoj.

Armand Su
Tientsin, ĈINIO

Pli facile estas varbi kvindek novajn esperantistojn-
ol realtiri al la movado unu malnovan elrevigitan fer-
vorulon.

Ada (El la „Intima libro de la Verdurbaj esperan-
tistoj“)

La nomo Miti — pseŭdonimo de nia samideano Dimitro Zlatarski — estas bone konata al la Esperanto-generacio de nia lando de la periodo 1923 ĝis la jaroj de la lasta monimilito. Liaj versaĵoj — originalaj kaj tradukitaj — faris impreson kaj altiris la atenton de la bulgara esperantistaro. Krome sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ de la pasintaj jaroj aperis seriozaj studoj kaj notoj pri lingvaj demandoj, skribitaj de tiu talenta samideano.

Dimitr Zlatarski naskiĝis dum 1903 en Varna. En 1922 li finstudis la lokan gimnazion kaj dediĉis sin al instruista profesio. Sur tiu ĉi kampo de nobla porpopola laboro li laboras kiel distingita unuagrada instruisto jam multajn jarojn.

Bedaŭrinde en la lastaj jaroj li malproksimiĝis de la Esperanto-movado, por kiu li kontribuis multe en la pasinteco, kaj fariĝis preskaŭ fremda al la nuna esperantista generacio.

Jen kiajn notojn pri sia esperantistiĝo li donis responde al nia enketa demando:

„Pri Esperanto mi aŭdis de unu mia samklasano Mihail Markov Kojuharov (kiu poste mortis). Iun tagon li alportis en la lernejon esperantan libron. Li estis filo de barelisto kaj loĝis najbare al la apoteka magistro Minail Milĉev kaj al la butikisto Vasil Băčvarov, same esperantisto.

Mihail Markov, kiu jam sciis Esperanton, klarigis al ni kie estas la butikoj de Vasil Băčvarov tiel detale, ke ni tre facile trovis la butikon kaj rekonis la butikiston, kiu sciis pli ol dek lingvojn, kiu korespondis kun la tuta mondo kaj estis delegito de la Universala Esperanto-Asocio por Varna — unika delegito en Varna kaj peĵ malnova jam esperantisto en la urbo. Nin akompanis ankaŭ mia amiko Hans; li same ekinteresiĝis.

„Ricevinte de s-ro V. Băčvarov po unu „ŝlosileto“, ni ambaŭ komencis lerni Esperanton inter niaj ceteraj okupoj en nia libera tempo, aŭtodidakte kaj nur per la „ŝlosileto“.

„Baldaŭ finiĝis la lernjaro, la somera ferio disigis min kaj Hans; kun M. Markov mi malofte renkontiĝis, sed la bacilo de Esperanto fatale min infektis kaj tenis min en ĉiama ankso.

„Poste mi konatiĝis kun s-ro M. Milĉev. Li promesis aranĝi kurson de Esperanto. La nova lernjaro komenciĝis. Mi estis en la antaŭlasta klaso de la gimnazio, Hans — en la lasta. En la knaba gimnazio malfermiĝis vespera trimonata Esperanto-kurso. Post ĝia finiĝo en januaro 1921 oni restarigis la esperantistan grupon „Fratego“ kaj ni aliĝis al ĝi. Ja ni estis tre fervoraj kursanoj kaj estiĝis ankaŭ aktivaj membroj de la grupo. Ni regule vizitis ankaŭ la sekvantan kurson trimonatan en la aŭtuno 1921, gvidatan same de M. Milĉev. Mi estis en la lasta klaso, Hans estis jam finstudinta la gimnazion.

„Kaj hodiaŭ? — Nun mi korespondas nur de tempo al tempo kun malnovaj geamikoj: Hilda Dresen, Ada ka.

„Rilatoj kun la Esperanto-societo „Albatro“ en Varna? — Jes, mi kulpas! Kun ĝi mi ne riatas, al ĝi mi ne povas esti utila, tie estas homoj, kiuj povas labori, kaj oni ja laboras.

„Versaĵojn mi verkas nun malofte — tempon mi ne havas. Mi sendis unu versaĵon al la gazeto „Paco“, sed ne por publikigo — mi eĉ skribis, ke oni ne enpresu ĝin“.

Tio estas la nunaj rememoroj kaj la konfesoj de nia „iama“ Miti.

Liaj originalaj kaj tradukitaj versaĵoj estis ĉiam preskaŭ senriproĉaj lingve kaj stile. Tre sagaca kaj sprita majstro li estis de ŝercaj parodioj. Li konis kaj ja ankoraŭ konas la lingvon akademie — ĉio ĉe li estas akademia, t. e. ĉiu lia eĉ plej ordinara scio estas ĉiam nur profunda, detala, historie lumigita, science klarigita.

En la vilaĝo Dalgopol, kie li estis instruisto, li fondis tre interesan kaj riĉan arĥeologian muzeon, sed . . . , sed tute malpardoninde forlasis kaj perdis la manuskripton de enciklopedia Esperanto-Esperanta vortaro, super kiu li laboris kelkajn jarojn en la unua periodo, kiam li ekloĝis en tiu vilaĝo.

Ni tamen esperu, ke Miti denove eniros nian movadon kaj kontribuos por Esperanto kaj per Esperanto por la paco, la kulturo kaj la scienco. Ni esperu, ke ne ĝis la fino de sia vivo li restos forŝuginta de la esperantistaro.

Oni diras ja: kie akvo fluis, ĝi denove ekfluos — frue aŭ malfrue.

Zora Mladenova — Hans

FELIĈAN NOVAN JARON!

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas ĉiujn siajn regulajn legantojn okaze de la nova jaro kaj deziras al ili feliĉan kaj ĝojplenan jaron!

La redakcio aparte gratulas siajn kunlaborantojn-aŭtorojn, kiel At. D. Atanasov — Ada el Sofio, Rosica Georgieva el Pazargik, Dimo Trudoljubov el Jambol, Nano Nanov el Sofio, Boris Kavalĝiev el Ruse, Asen Grigorov el Sofio, Zora Mladenova-Hans el Varna, Simeon M. Simeonov el Sofio, Dobri Dobrev el St. Zagora, Kina Uzunova el v. Umarevci, Ivan Canev el Sofio, Ivan Draganov el Sofio, Petko Gamiŝev el Burgas, At. Gaev el Asenovgrad k. a. Ni gratulas ankaŭ niajn eksterlandajn aŭtorojn G. Deŝkin, S. Izmajlov, I. Lisiĉnik, V. Rojdestvenskij, V. Ardes k. a. el Sovetunio, E. Kaminska k. a. el Pollando, F. Franciski el Italio, M. Jakubcova el Ĉenoslovakio, Raul Sedeno el Kubo k. a. Al ĉiuj aŭtoroj ni deziras grandan literaturan fekundecon dum la nova jaro.

La redakcio gratulas la aktivajn perantojn Ivan Palkin en Moskvo (Sovetunio), Julia Franciski en Padova (Italio), Mihail Popesku en Bukureŝto (Rumanio), Ru Bossong en Eindhoven (Nederlando) kaj la ceterajn.

La redakcio gratulas ĉiujn aktivulojn, kiuj varbis multe da abonintoj. Specialan gratulon al k-do Dimitr Ivanov el Plovdiv, kiu varbis plej multe da abonintoj. Ni deziras al ili feliĉon kaj freŝajn fortojn por ankoraŭ pli granda aktiveco dum la nova jaro.

La redakcio gratulas ankaŭ la sofiajn kamaradojn, kiuj regule, fervore kaj senprofite helpis la administradon de la gazeto: Georgi Petrov, Ivan Draganov, Ĥristo Kurtev, Apostol Penĉovski, Nikola Terzijski k. a. Ni deziras al ili feliĉon, sanon kaj bonfarton.

CK de BEA gratulas okaze de la nova jaro ĉiujn societajn estrarojn, aktivulojn kaj membrojn, dezirante al ili novajn sukcesojn en la Esperanto-agado.

LA ESPERANTISTARO KONSTRUAS SIAN MONTODOMON

Malgraŭ la malbona vetero la konstruado de la montodomo daŭras. Ĉiudimanche deko da geesperantistoj fervore laboras. En la granda peno por finkonstruo de la montodomo ĝis la 48-a UK iom post iom envicigas la geesperantistoj el la tuta lando, eĉ iuj el eksterlando. Kun danko ni informas la ricevon de la jenaj kontribuajoj:

Studenta E-societo „V. Peeva“, Sofio	30 lv. (entute 50 lv.)
Bulgara E-kinoklubo, Sofio	50 „
Aleksandâr Dimitrov, „	25 „
ing. Simeon Simeonov, „	10 „ (entute 25)
Ivan Kotov, „	10 „
G. Dumont, Muttenez, Ŝvislando	10 „
Metodi Panĉev, Sofio	5 „
Grigor Ĝeljavski, Sofio	3 „
Maria Vasileva, „	3 „
N. Grozdanov, „	2 „
N. Draganov, „	2 „
Violin Oljanov, „	2 „ (entute 25)

Novaj fondintoj de la montodomo: Studenta E-societo „V. Peeva“, Sofio; Bulgara E-kinoklubo, Sofio; ing. Simeon Simeonov, Sofio; Aleksandâr Dimitrov, Sofio; Jordan Vojnov, Sofio (postmorte).

Familiano de fondinto povos fariĝi tian, pagante 15 levojn.

Fratoj Ivan kaj Sotir Vasilevi el Pazargik pretigis kaj transdonis la promesitan marmoran memortabulon.

Ĉiuj devas helpi la konstruadon kaj la mebligon de la unika en la mondo esperantista montodomo. Fariĝu fondinto.

Okaze la alveno de 1963 jaro ni salutas ĉiujn, kiuj per mono, laboro aŭ inventario kontribuis al la konstruado kaj la mebligo de la montodomo „Esperanto“.

Ni esperas, ke ankaŭ en 1963 oni malavare helpos por ke la esperantista montodomo estu inaŭgurota dum la 48-a UK.

La estraro de la turista sekcio „Esperanto

ANKORAŬ NE TIOM KONATA

Iun tagon Napoleono sentis sin mal-sana kaj ordonis pri kuraciŝto. Kaj ĉar lia privata kuracisto estis ankaŭ mal-sana, venis tute nova medicinisto, nekonata al la reganto.

— Kiom da tomboj vi plenigis ĝis nun? — demandis arogante la paciento.

— Ne tiom, kiom via imperatora moŝto — respondis la kuracisto. Ĝuste

pro tio mi ankoraŭ ne estas tiom sana kiel vi.

LASTA DEZIRO

— Kia estas via lasta deziro? — oni demandis kondamniton je morto antaŭ la ekzekuto.

— Supo el fungoj.

— Kial el fungoj?

— Ĉar dum mia tuta vivo mi neniam manĝis fungojn pro timo.

DEZIRAS KORESPONDI

BRAZILIO

Sydney Moreira Costa (18 jara fraŭlo), Rua Cabiuna, 697-Augusto Vasconcelos, GB, Rio de Janeiro

Amilton Rosa Macedo (21 jara fraŭlo), Rua Turibori, 77-Augusto Vasconcelos, GB, Rio de Janeiro.

Emilia Coelho (23 jara f-ino), Av. Cesário de Melo, 868/202, Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Maria Aide de Oliveira (20 jara f-ino), Rua Pontes Leme, 480-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Marilene De Macedo (19 jara f-ino), Rua Mário Barbosa, 39-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Meiby Calixto Machado (25 jara f-ino), Rua Virgílio Brígido, 6-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Adelia Ribeiro (18 jara f-ino), Rua São Joaquim, 181-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Dulcileia Oliveira (17 jara f-ino), Av. Cesário de Melo, 455 Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Lacyr Siqueira (32 jara f-ino), Rua Comendador Siqueira, 591/casa 6, Jacarépaguá, Rio de Janeiro.

Raul Bezerra Costa Filho (16 jara fraŭlo), Rua Cabiuna, 697-Augusto Vasconcelos, GB, Rio de Janeiro.

USSR

Vytautas Blauzdys, str. Agronomijos 36—86, Panevėžys, Litovio, 21 jara, kun bulgaraj esperantistoj pri E-movado kaj interŝanĝas esperantistaĵojn.

Georgij S. Zaharov (28-jara teknikisto, konstruisto), 10-j gorodok, 43 A, Tbilisi 13, Gruzio — kun ĉi pri ĉi kaj interŝanĝas E-librojn, gazetojn, BK, gramofondiskojn. Respondo garantota.

Leo Ĉinajev, 1 Krasnij pereuiok, 9, Tula — kun ĉi pri astronomio kaj antikva arto.

Vadim Roginskij (17 jara, studento-historisto), Kutuzovskij prospekt 37, kv. 260, Moskva G — 165 — kun ĉi pri historio, politiko kaj esp. novaĵoj, interŝanĝas PM, PK, insignojn.

JUGOSLAVIO

Novak Mrkić (20 jara studento), ul. Mlade Bosne 16/II, Beograd — kun ĉi pri ĉi, interŝanĝas diversaĵojn.

RUMANIO

Florin Caragea, str. Popa Petre 28, Bucuresti 9 — kontraŭ eltolaj blazonoj (de urboj kaj landpartoj el la tuta mondo!) kaj Esp. glumarĉoj, reciproke-kompense sendos laŭdezire aŭ interkonsente ŝatataĵojn el mia lando.

POLLANDO

R. O. ZSP „Signal“, Łódź, Piotrowska 77 — Esperanta Studenta Klubo „Signal“ aranĝas la 15-an de februaro 1963 la „letervesperon“. Tial Klubo „Signal“ petegas ĉiujn klubojn, rondojn (precipe studentajn) kaj esperantistojn, por ke partoprenu en nia aranĝo. Krom tio ni deziras, por ke ĉiuj studentoj kaj aliaj esperantistoj kunlaboru kun nia klubo.

OKCIDENTA GERMANIO

Por la venontjara vojaĝo al la kongreso en Sofio mi jam serĉas korespondan kontakton kun geesperantistoj el Sofio kaj Varna. Bonvole skribu al: Richard Hirsch, Bad Hersfeld, Unter der Stiegel 27.

BULGARIO

Kosta Cvetanov Eremiev. V. Boŭjrica, distr. de Pleven

NOVA ESPERANTISTA JUNA PARO

Kun ĝojo ni anoncas la edziĝon de Blagoveska Benovska kaj Ivan Ljuckanov — dum pluraj jaroj prezidanto de la junulara grupo en Ruse. Al la nova esperantista paro ni bondeziras feliĉon kaj sukcesojn.

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAJEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (viceĉefredaktoro)
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Vasilka Petrova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82

Проверете в местния пощенски клон, дали срокът за приемане на абонаменти за

„BULGARA ESPERANTISTO“

е продължен. Ако не е — можете да изпратите абонамента си до редакцията, п. к. 66, София.

Краен срок — 20 януари.

Редакцията направи постъпки за продължаване на срока, за да се осигури абонирането на **всички есперантисти** в страната.

Другари активисти! Положете последни усилия, за да абонирате неуспелите да сторят това в първоначалния срок. След 20 януари срокът повече няма да бъде продължаван.

Излезе от печат

УЧЕБНИК ПО ЕСПЕРАНТО

от Иван Сарафов и Симеон Хесапчиев

IV стереотипно издание

Цена 0,57 лв.

Доставя се от книжарниците на ДТП „Печатни произведения“ и Българската есперантска кооперация.

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

abonigas al la jenaj eksterlandaj gazetoj:

Heroldo de Esperanto 4,68

Monda kulturo 4,88

Esperanto (kune kun membreco
al UEA) 4,88

Paco 1,20

El Popola Ĉinio 1,00

La asocio disponas ankaŭ propagandajn glumarkojn.
Unu folio de dek markoj kostas 15 stotinkojn, tri
folioj kostas 40 stotinkojn.

Vietnamio antaŭenmarŝas 1,00

Sumojn kaj abonleterojn sendu al: **Bulgara Esperantista Asocio**, п. к. 66, Sofia.

